

& Pli da lumo!:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 232 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (Verdkata testamento, 1929). Baladigis Martin Strid (2016) per feroaj melodio kaj rekantaĵo tradukita de Bresta balado.>

(#Melodio:

<1,6:29> (

/dolTi redo doTi TiiTi;Ti La3La LaMi LaLa; LalTi doTi TiTi TiiTi;Ti TiTi Tire dodo;

(#Rekantaĵe: TiLa La SiLa Ti La; LaaLaLa La3Mi So3So Fa3Mi; MiiMiMi LaTi do Ti La a)

)×8)+

(&Strofoj:

'1 /Du2m nigre nigra nokto ; Promenis tra l'arbaro ; Pe2rdinte sian vojon ; La geamanta paro.

(×:; **Paŝu gajan la dancon ; Brilas aŭroro bele taga ; Venu en alta somertemp'!**)

'2 Precipe pro mallumo ; La geamanta paro ; Ne plu sukcesis trovi ; Eliron el arbaro,

'3 Kaj sole solaj ambaŭ ; Jam ne kuraĝis spiri, – ; Sed la junulo konis ; Rimedon por eliri!

'4 Rimedo por lumigi ; De nokto plej malhela ; Facile ja troviĝas ; Ĉe knabineto bela ;

'5 Kaj ĉar ŝi bela estis, ; En kor' de l' juna viro ; Subite arde... *brulis* ; Pekeca amdeziro!

'6 Ĉe la knabin' responde ; Al lia am-espero ; En bluokuloj... *fulmis* ; *Helege ĝoj-fajrero!*!

'7 Elektran fluon sentis ; Tuŝante ŝin la viro, ; Kaj sekve tuj fariĝis ; Li la elektra piro!

'8 Li nun pri amo petis ; Kun *flamo* de l' ampeto, ; Kaj scias ni, ke *lumas* ; La *flamo de lampeto!*!